

JOSEPH R. SCHERER, Prez. de EANA:

Esperanto en grava filmo

Laborado kaj babilado kun Norma Shearer

(Verkita por ĉiuj Esperanto-gazetoj kiuj deziras uzi la enhavon.)

Kiam Reĝisoro Clarence Brown okaze de la unua intervjuo diris al mi ke en la filmo « Idiota Amuzo » Norma Shearer ludos la inan ĉefrolon, mi multe antaŭgojis ke mi havos la plezuron post naŭ jaroj revidi la famegan filmstelon.

Tra mia kapo flugis rememoroj pri granda bankedo aranĝita en 1929 de la Hollywood'a Asocio de Fremdaj Journalistoj en la luksa kaj fama Hotelego Roosevelt. Ĉeestis tiam proksimume 50 ĵurnalistoj kaj 200 filmgastoj.

Estis tie kie mi unuafoje povis premi la manojn de Carl Laemmle, Prezidanto de Universal Filmfarejo; de Irvin Thalberg, grava estro ĉe M.G.M. kaj de lia edzino Norma Shearer kiu jam tiam pli kaj pli estis famiĝinta pro mirinda laboro kiel filmaktorino.

Mi estis eble la plej malgrava membro de la ĵurnalista asocio. Tiam preskaŭ neniu en Hollywood ion sciis pri Esperanto. Neniu iam estis aŭdinta ion pri « Heroldo de Esperanto » nek pri aliaj gazetoj (ĉefe svisaj), por kiuj mi skribis artikolojn. Aliaj membroj estis reprezentantoj de la plej grandaj ĵurnaloj de la mondo.

Tamen, post la festmanĝo, mi havis la kolosan kuraĝon peti la faman filmstelon Norma Shearer ke ŝi dancu kun mi. Aliaj multe pli gravaj ĵurnalistoj ne kuraĝis alproksimiĝi al ŝia tablo.

Sia nomo estas elparolata ekzakte kiel la mia (ŝerer). Do mi ne petis formalan prezentadon al ŝi kiel kutime necesas en Usono. Mi simple diris al la famegulino: « Car mi havas la saman nomon kiel vi, mi estus tre feliĉa ĝui dancon kun vi ». Ĉiuj miregis kun malfermitaj buŝoj pro mia kuraĝo kaj eĉ pli pro tio ke ŝi konsentis danci.

Sed pri kio babili? Estis longa duobla

danco. Mi ne jam povis rakonti pri mondvojaĝoj. Eĉ mia scio de la angla lingvo estis ne tute perfekta. Sed mi tuj menciis Esperanton al ŝi, kaj trovis ke ŝi estis interesata pri la alta valoro de nia lingvo por plibeligi la mondon kaj plibonigi la homaron.

Post la dek-minuta dancado ŝi prezentis min al sia edzo kaj al aliaj famuloj. Tio poste multe helpis al mi persone « ataki » eminentulojn de la filmurbo en intervjuoj pri kiuj aperis raportoj en la Esperanta gazetaro dum la lastaj dek jaroj.

★

Sed pasis naŭ jaroj, dum kiuj Norma Shearer ĉiam pli famiĝis. Mi admiris ŝiajn mirindajn filmojn kie ajn mi estis en kvar mondpartoj. Kaj nun, baldaŭ, mi revidos ŝin! Dum ŝia edzo mortis en 1936, kaj Norma Shearer estis nun admirata patrino de du tre ĉarmaj infanoj. De la edzo ŝi heredis kelkajn dolar-milionojn. Ŝi fariĝis la plej riĉa filmstelo en la mondo, kaj krom tio la « reĝino de la inaj filmsteloj ».

Kaj tia famulino ludos en la unua grandfilmo, en kiu Esperanto estas uzata en kelkaj dialogpartoj! Jus mi estas admirinta ŝin en la filmoj « Marie Antoinette » kaj « Romeo kaj Juliet ». Mi ankaŭ neniam povis forgesi ŝian arton en la filmoj « Libera Animo », « Stranga Interludo », « La Barretts de Wimpole Strato » kaj aliaj.

Neniu alia ina stelo kuraĝis ludi en tiom diversaspecaj roloj. Ŝi ricevis multajn honorojn de la Film-Akademio de Hollywood. Sia kredo estas: « Vi devas riski malsukceson por akiri sukcesojn ». (Eble ŝi pensis ke mi sekvas la saman principon, kiam mi petis ke ŝi dancu kun mi).

Post malfacilaj jaroj, dum kiuj ŝi ba



Sinceraj
Salutoj
al la
Esperantistoj

Norma Shearer
1-1-1939

NORMA SHEARER

nuna reĝino de la inaj filmsteloj de Hollywood en la malfacila rolo de
pretenda anino de la cara familio.

talis por akiri sukcesojn, ŝi iom post iom atingis la zeniton en sia filmkarieto kaj sukcesis resti tie jam de kelkaj jaroj.

★

Sekvis ses semajnoj, dum kiuj mi vidis ŝin ĉiutage. Mi povis observi, kiel ŝi tre serioze sin preparas por ĉiu sceno, kaj kiel dum la filmigo de sceno ŝi kaptas la admiregon de ĉiuj kiuj kunlaboras en ŝia laborgrupo (20-50 personoj kutime).

Mia tasko estis instrui Esperantajn dialogopartojn al diversaj geaktoroj, kaj atente aŭskulti, ĉu ĉiu vorto estas korekte kaj bele parolata dum la filmigo. Oni ankaŭ uzis kelkajn cent afiŝojn en la diversaj partoj de la stacidomo, en la vagonaro kaj en la hotelo, kaj mi respondecis ke ĉio estis korekta.

Norma Shearer devis ludi la malfacilan rolon de pretenda anino de la car-familio. En pli fruaj partoj de la filmo ŝi estas simpla, malriĉa usona akrobatino. Clark Gable ludas en la samaj teatroj. Kelkajn jarojn pli malfrue ili denove renkontiĝas kune kun aliaj angle parolantaj vojaĝantoj, en montara turistohotelo.

Pro militeksplodo neniu povas transiri la landlimon. Norma Shearer nun estas altnobelino, kaj kun rusa akcento rakontas al aliaj turistoj pro sia « onklo, la caro de Ruslando » ktp. Clark Gable tuj suspektas ke ŝi estas la iama malriĉa akrobatino, sed ŝi estas tro lerta kaj tro mondsperta mensogantino. Li ne sukcesas pruvi al ŝi ke ŝi estas eksterdube la iama ruĝhara akrobatino. Si rakontas al s-ro Gable — inter du dancoj — kiel ŝia edzo vojaĝas tra Eŭropo por vendi municion al ĉiuj registaroj. Tra la fenestroj oni vidas amason da bombaeroplanoj kiuj iras detrui la ĉefurbon de najbara lando... Por ne impliki iun ajn landon kaj tamen doni la impreson ke oni troviĝas en eŭropa lando, la oficiroj kaj aliaj enlanduloj parolas Esperanton. Sed la ĉefaj geaktoroj ĉiuj parolas angle, kaj tiel ankaŭ la enlanduloj kiam ili parolas kun la turistoj.

La rolo de Norma Shearer estas treege malfacila. Ŝi plej facile ludas sincerajn rolojn de decaj virinoj. Sed ĉi-foje ŝi pretendas esti nevino de la caro — kaj ŝi tre sukcesas kun tre forta rusa akcento.

Inter la scenoj estas ĉiam kelka tempo

por babili, escepte se la filmsteloj devas enkapigi malfacilajn liniojn. Ciu sceno estas fotografata 3-5-20-foje ĝis kiam la reĝisoro certas ke almenaŭ dufoje la sceno estis ludata 100-procente perfekte. Poste oni bezonas 20-60 minutojn por aranĝi la maŝinaron por sekvonta sceno.

Inter tiaj scenoj mi ofte havis eblecon babili ankaŭ kun Norma Shearer. Esperanto nun kompreneble estis jam pli serioza afero. Ŝi ofte volis aŭdi pri miaj dumaj spertoj kun Esperanto en malproksimaj landoj. Mi ankaŭ konstatis ke ŝi havas bonan komprenon pri la valoro de neŭtrala lingvo.

Jen sekvas kelkaj interŝanĝoj de opinioj:

Norma Shearer: « Mi ĝojas ke mi nun ludas en la unua grava filmo, en kiu Esperanto estas parte parolata. »

S-ro Scherer: « Mi ja bedaŭras ke vi mem ne devas paroli almenaŭ kelkajn vortojn en Esperanto. Sed tamen la esperantistoj de la mondo estas al vi tre dankemaj pro tio ke vi helpas propagandi nian lingvon. »

Norma Shearer: « Kiel do mi helpas al la esperantistoj? »

S-ro Scherer: « Nu, centmilionoj da homoj venos al la kinejoj por vidi vin kaj por admiri vian arton en tiu ĉi filmo. Samtempe ili vole-nevole aŭdos Esperanton. Centmiloj da skeptikuloj konvinktiĝos ke Esperanto ne estas nur koka skribebla, sed vera lingvo fluege parolebla. »

Norma Shearer: « Mi bone konstatis ke Esperanto estas ne nur lingvo fluege parolebla, sed ke ĝi estas ankaŭ lingvo tre muzika, klara kaj natura. Neniam suspektus ke tiu ĉi bela lingvo estus arte farita. »

S-ro Scherer: « Kion vi pensas pri la efiko de tia facila neŭtrala lingvo, se parolata de la homaj amasoj en ĉiuj landoj? »

Norma Shearer: « Se la popolaj amasoj povus mem inter si paroli kaj havi amasan rektan kulturalan kontakton, sed dube estus tre malfacile krei malamikajn sentojn kontraŭ najbaraj landoj. Oni parolas pri la praktika valoro de lingva studado... sed eĉ diplomatoj ofte ne kapas aĝas inter si paroli sen la helpo de tradukantoj. »

S-ro Scherer: « Ni havas mirindan tipan pruvon pri la malfacileco de naturaj naciaj lingvoj. En München ekzemple, 4 ŝtatestroj bezonis la helpon de interpretistoj. Estis la interpretistoj kiuj povis inter si paroli, ne la ŝtatestroj. »

Norma Shearer: « Mi povas imagi, kiom malfacile estas kiam du najbaroj en apudaj hejmoj ne povas paroli komunan lingvon. Ili ne povas interamikiĝi. Tradukanto inter ili estus tre lama helpilo. Se krome ili havas diversajn vivkutimojn kaj diversajn religiojn, reciproka pasiva malŝato facile povas fariĝi aktiva malamo. Traduko de gravaj diraĵoj inter diplomatoj estas nur lama, mizera kontakto inter du landoj. Tro ofte la tradukantoj malkorekte tradukas, kelkfoje eĉ intence. Tiel, pasiva malŝato inter du popoloj tro facile povas fariĝi aktiva malamo. »

S-ro Scherer: « Mi ĝojas ke vi havas tiel bonan komprenon pri la lingvaj malfacilaĵoj kaj pri la valoro de Esperanto. »

Norma Shearer: « Mi kredas ke la uzo de unu neŭtrala mondlingvo multe helpos por fari ke la mondo fariĝos pli bona planedo, sur kiu la homaro povos vivi pli pace kaj pli feliĉe. »

★

Rapide forflugis la konversaciaj kvaronhoretoj kaj duonhoroj inter la scenoj. Kaj tro rapide forflugis la tri monatoj de la filmigo. Mi denove vidos la faman filmstelon, kaj mi ŝatus prepari por ŝi dikan libron kun centoj da eltranĉaĵoj el gazetoj de ĉiuj mondpartoj kun tradukoj de ŝiaj vortoj pri Esperanto. Saman libregon, mi deziras prepari por M.G.M. kaj unu libregon por mi. Pro tio mi petas pri sendo de eltondaĵoj ankaŭ pri Norma Shearer. Sed ne forgesu indiki la nomon kaj daton de la koncernaj ĵurnaloj — kaj ankaŭ vian landon: kaj per kolorkrajono bonvolu marki kie estas la artikolo. Kelkfoje mi eĉ ne povas trovi ĝin.

Mi disponigas al « Heroldo de Esperanto » kvanteton da fotobildoj de Norma Shearer kun esperantlingva aŭtogramo. Ili estas haveblaj presitaj sur kreta papero kaj taŭgas por farado de kliŝoj por uzo en aliaj ĵurnaloj kaj revuoj. Sendu du respondkuponoj al Heroldo (por poŝtmarkoj, koverto kaj servo).

Esperantistoj kiel famuloj sur la kampo de Muziko

Nia samideano, la konata hungara pianistino kaj komponistino, s-ino **Klara Géczy Fazekas**, komponis Nordhungaran Marŝon, kiun ŝi dediĉis al lia moŝto, la hungara gubernatoro Nikolao Horthy de Nagybánya. Nun la kabinet-oficejo de la gubernatoro dankis la komponistinon per varmtona letero. La vizitintoj de la Universala Kongreso en Romo certe memoros pri la granda sukceso, kiun nia hungara samideano rikoltis tie okaze de la kongresa koncerto. Al s-ino Géczy Fazekas nian koran gratulon!

En Aschaffenburg (Germanujo) mortis **Jörg Mager**, malnova esperantisto, kaj la germana gazetaro dediĉis al li honorajn nekrologojn kiel al « la inventinto de la elektro-akustika muziko ». Mager inventis plurajn instrumentojn por la produktado de tonoj per elektro-akustika vojo. Jam antaŭ unu jardeko oni multe atentis pri la novspecaj instrumentoj de Jörg Mager, per kiuj li sukcesis akiri preskaŭ nelimitan multspecaron da sonnuancoj sole per utiligo de tiuj faktoroj kiuj akustike rezultas per la radio-lampo. Siajn pliperfektigitajn instrumentojn, kiel la « Sphaerophon » (sferofono) kaj la « Partiturophon » (partiturofono), li konstruis kun la fincelo, kvazaŭ ĉerpi la tutan instrumentaran sonnuancaron pura kaj nedependa rekte el la ond-etero. Ankaŭ « Heroldo de Esperanto » en pli fruaj jaroj plurfoje publikigis artikolojn pri la laboroj de Jörg Mager.

Ni povas aldoni la nomon de blinda samideano, **Imre Ungar**, mondfama pianisto, kiu donas koncertojn en la plej famaj artcentroj kaj bankazinoj de la mondo. En 1937 kaj 1938, ekzemple, li prezentis sian arton kun granda sukceso ankaŭ en la Kazino de Scheveningen.

Gazetajn eltondaĵojn (prefere tutajn paĝojn) bonvolu sendi en 2-3 ekzempleroj rekte al s-ro Joseph R. Scherer, 212 S. Grand Ave., Los Angeles, Calif.